

INTERNACIA

JURA

REVUO

B·U·D·A·P·E·S·T



I N T E R N A C I A J U R A R E V U O

organo de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj

-----

II-a Jaro - N-ro 4 /5/

Oktobro-Decembero 1967

E N H A V O

	Pago
KOMPARAJ INFORMOJ PRI LA POZICIO DE ADVOKATO EN SOVETA UNIO KAJ JUGOSLAVIO:	Prof.Dro I.Lapenna /Wembley/ 2
LA ŜTATANECO EN LA JURO DE FINNLANDO:	E.Gadd /Imatra/ 5
LA ŜTATANECO EN LA JURO DE FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANUJO:	Dro L.Röll /Höchstädt/ 7
LA ŜTATANECO EN LA JURO DE HUNGARIO:	Dro L.Márton /Budapest/ 9
ĜENERALAJ TRZKOJ EL CIVILA KODO DE Ukr. S.S.R.:	Ŝnejder /Ĥarkov/ 12
PRI LA INTERNACIAJ AĈETOJ:	H.P.Lundgaard /Oslo/ 14
EVENTOJ DE I.E.A.J.	19
SENKOMENTARIE...	21
INFORMO PRI LA KOTIZOJ	21
OPINIO...	21
NI FUNEBRAS KAJ KONDOLAS	22
LIBROBRETO: "KONSITUCIOJ DE NOVAJ LANDOJ"	- m.l. - 22

-----

Redaktero:

Dro Lajos Márton

B u d a p e s t

JUGOSLAVIO.

1. N o c i o.

En Soveta Unio la privata advokateco estis abolita, kune kun la antaŭrevoluciaj kortumoj kaj la malnova prokurora institucio, per la Dekreto pri la Kortumoj Nro 1. Dum kelka tempo ĉiu ajn negockapabla civitano povis esti ĉu akuzanto, ĉu defendanto antaŭ la kortumoj. Sed jam en marto 1918, per la Dekreto pri la Kortumoj Nro 2 estis antaŭvidite, ke ĉe la sovetoj de deputitoj formiĝos specialaj kolegioj de personoj, sin dediĉantaj al jura reprezentado. Tiuj kolegioj de juraj reprezentantoj estis organizitaj kiel organoj de kolektiva akuzado kaj defendado. Tamen, plue restis la rajto de la plenaĝaj civitanoj, troviĝantaj eĉ hazarde en la kortuma salono, ekstarti kiel akuzantoj aŭ defendantoj en la proceso. La kolegioj de juraj reprezentantoj konsistis grandparte el malnovaj advokatoj, kiuj ne povis "forĵeti la antaŭajn praktikojn, kutimojn kaj metodojn de laboro de la malnova advokateco," kiel diris Lenin. En 1920, per la Dekreto de la 21-a de oktobro la juraj reprezentantoj estis definitive abolitaj kaj la tasko de persekutado estis disigita de la tasko defendi. Laŭ tiu Dekreto la kortumoj havis la rajton alvoki kiel defendantojn nur tiujn personojn, kiuj havis fakan juran scion. Estis faritaj specialaj listoj de tiaj personoj. Efektive, ili ne okupiĝis profesie pri defendado, sed laboris kiel oficiistoj en diversaj institucioj kaj entreprenoj. Kiam ili estis vokitaj defendi antaŭ kortumo, la ĉefoj de la oficejoj devis liberigi ilin de la laboro, por ke ili povu reprezenti la defendon antaŭ la kortumo. Ankaŭ la juraj konsultistoj de diversaj departementoj de justico en la sovetoj povis esti, se necese, vokitaj plenumi tiun funkcion. Same tiel oni permesadis al la reprezentantoj de la sindikatoj, al kiuj apartenis la kulpigito, kaj al liaj plej proksimaj parencoj, funkcii kiel defendantoj en tiu konkreta kazo.

En 1922, samtempe kun la reorganizo de la kortuma sistemo, estis fondita ankaŭ la soveta advokateco. La Regularo pri Advokateco de 1922 starigis la ĝeneralajn principojn pri la funkcioj de advokatoj kaj preskribis la kondiĉojn por fariĝi advokato. Interalie estis postulate: jura eduko aŭ minimume dujara praktiko pri juraj aferoj. La honorario devis esti pagita laŭ la financaj eblecoj de la kliento aŭ laŭ fiksa tarifo. La laboro efektiviĝadis aŭ en specialaj konsultaj oficejoj, kie la advokatoj laboris kolektive, aŭ individue en privata oficejo. Sed tiu ĉi dua formo estis konsiderata kiel nekonforma al la nova reĝimo, ĉar ĝi montris aron da "negativaj trajtoj", inter kiuj estis speciale akcentita "la malebleco de regula kaj ĉiutaga kontrolado de la laboro de la advokato" /V. Turin/. Tial tiu ĉi "privata" formo de laboro estis baldaŭ detruita kaj la tuta aktiveco de la advokatoj estis devige centrigita en la "juraj kolektivoj". La prezentitan staton firmigis la nova Regularo pri la Advokateco entenita en la Dekreto de la 16-a de aŭgusto 1939, surbaze de kiu la soveta advokateco estas organizita kaj funkcias ankaŭ hodiaŭ. Nun estas atendata nova Regularo, sed ĝi tre verŝajne ne alportos iajn esencajn ŝanĝojn.

En Jugoslavio la advokateco kiel institucio neniam estis formale abolita, kiel tio okazis tuj post la Rusa Revolucio. Post la milito, kvankam multaj malnovaj advokatoj estis senigitaj de la rajto praktiki, tamen la advokateco kiel tia ne estis abolita. En novembro 1944 la tiam registaro nomis po unu t.n. "delegito" en ĉiu el la tiam ekzistantaj advokataj ĉambroj kaj komisiis lin "purigi la

profesion" de nedezirindaj elementoj. En decembro de 1946 estis publikigita la unua Leĝo pri Advokateco, kiu celis organizi la advokatecon en Jugoslavio, se ne tute, do almenaŭ grandparte laŭ la soveta modelo. Tio vidigas klare el la fundamenta koncepto pri la rolo de la advokato. Laŭ la soveta teorio, la advokateco estas difinita kiel "publika funkcio" aŭ kiel "funkcio de ŝtata reprezentado de la rajtoj kaj laŭleĝaj interesoj de la unuopaj civitanoj, kiuj rolas kiel kulpigitoj, akuzantoj kaj akuzitoj en la kriminala kaj civila procesoj". En Jugoslavio, laŭ la esprimo al la menciita leĝpropono, la advokateco estis difinita kiel "speciala socia funkcio" aŭ kiel "publika funkcio", "kiel funkcio de helpo al la ŝtataj organoj". Višinski asertis, ke la advokato devas posedi "altan komprenon de politika respondeco, altan politikan kvalifikon". Laŭ li, la advokato devas prezenti sian starpunkton "ne en la intereso de la kliento, sed pro la intereso de la socialisma konstruo, pro la intereso de nia ŝtato". Laŭ Hrnčević, tiam prezidanto de la Supera Kortumo de Jugoslavio, la advokatoj "devas konformiĝi al la ĝeneralaj etikaj principoj, al la etiko de la socialista homo kaj de la socialisma socio" kaj lia tasko estas "kontribui al la konsolidiĝo de la socialisma ordo", nome de tiu reĝimo, kiu tiam ekzistis en Jugoslavio.

La leĝo de 1946 intencis proksimigi la jugoslavian advokaton al la soveta ankaŭ rilate la kolektivajn laboron. Estis antaŭvidite, ke la advokatoj povos praktiki aŭ individue en privataj oficejoj, aŭ komune en la t. n. "libervolaj advokataj kolektivoj", do precize kiel laŭ la soveta Regularo de 1922. Tamen, la kolektiva laboro ne enkondukigis en la praktikon kaj la advokateco en Jugoslavio plue restis individua okupo en privataj advokataj oficejoj. La jugoslaviaj advokatoj montris tian reziston al kolektivigo, ke eĉ en 1955 Hrnčević plendis, ke "nia advokateco estas ankoraŭ privata profesio de la malnova tipo, grandparte tia, kia ĝi estis en la malnova Jugoslavio". Nuntempe la jugoslavia advokateco estas bazita sur la Leĝo pri la Advokatoj de aprilo 1957, kiu denove malproksimigis la profesion de la soveta advokateco.

En Jugoslavio, same kiel en Soveta Unio, la advokateco estas plue konsiderata kiel "publika servo", kies tasko estas doni juran helpon al la civitanoj, institucioj, organizaĵoj kaj entreprenoj. La helpo konsistas en donado de konsiloj, reprezentado de la partioj antaŭ la kortumoj kaj aliaj ŝtataj organoj, kunmetado de petaskriboj, plendoj, kontraktoj kaj aliaj dokumentoj. Ĝis tiu ĉi punkto la funkcio de advokato en la du landoj estas preskaŭ identa, sed ĉio alia estas nun malsama. La ĉefa diferenco estas, ke en Soveta Unio la laboro de la advokatoj estas kolektiva, dum en Jugoslavio ĝi estas individua. En Soveta Unio la partioj ne turnas sin al individua advokato, sed al la "jura konsultejo" kaj la direktoro de tiu konsultejo dividigas la laboron inter la advokatoj laborantaj en ĝi, fiksas la honorarion de ĉiu advokato por la jura helpo kaj kontrolas la kvaliton de la laboro. En Jugoslavio la partio turnas sin por helpo al unuopa advokato, kiu povas akcepti aŭ rifuzi la reprezentadon de la koncerna partio.

## 2. K v a l i f i k o j.

En ambaŭ landoj la leĝo preskribas kelkajn ĝeneralajn kondiĉojn por akiri la rajton fariĝi advokato. Tiaj kondiĉoj estas, ekzemple, ŝtataneco kaj nepuniteco pro difinitaj krimaj agoj. En ambaŭ landoj la advokatoj ne rajtas esti samtempe ŝtataj oficistoj aŭ oficistoj de institucioj, organizaĵoj kaj entreprenoj.

Granda diferenco ekzistas inter la du landoj koncerne la fakajn kvalifikaĵojn. En Soveta Unio la leĝo postulas nur aŭ superan /universitatan/ juran edukon sen iu ajn praktiko, aŭ mezgradan juran lernejon kaj unujaran praktikadon en kortumo aŭ en alia organo de justico, aŭ minimume trijaran laboron kiel juĝisto, prokuroro, esplorjuĝisto aŭ jura konsultisto, eĉ se la koncerna persono ne havas iajn ajn jurajn studojn. En Jugoslavio la faka kriterio estas multe pli severa. Povas fariĝi advokato nur persono, kiu diplomigis en jura fakultato; kiu krome havas praktikan laboron de minimume tri jaroj kaj kiu sukcese submetigis al speciala advokata aŭ juĝista ekzameno. El la trijara praktika laboro la kandidato devas pasigi minimume unu jaron ĉe advokato, minimume unu jaron ĉe kortumo, dum la trian jaron li povas pasigi ankaŭ en la oficejo de la publika aŭ milita prokuroro aŭ en diversaj aliaj institucioj en iliaj juraj departementoj. Profesoroj de juraj objektoj en juraj fakultatoj povas fariĝi advokatoj sen la trijara praktiko kaj sen la advokata aŭ juĝista ekzameno.

La rajto mem praktiki kiel advokato estas akirata en Soveta Unio per akcepto en la kolecion de advokatoj de la koncerna teritorio, kaj en Jugoslavio per enskribo en la liston de advokatoj en tiu advokata ĉambro, sur kies teritorio la advokato intencas malfermi sian oficejon. En Soveta Unio la malakceptita kandidato aŭ eksigita advokato rajtas apelacii. En Jugoslavio li ne havas tiun rajton, sed tie li povas iniciati administracian proceson, kiu ne estas konata en la sovetaj jura sistemo.

### 3. R a j t o j k a j d e v o j .

En ĉiuj civilaj procesoj, nekontraŭdira procedo, administraj aferoj la partioj povas en ambaŭ landoj reprezenti mem siajn interesojn en ĉiuj instancoj. En Soveta Unio, en kelkaj kazoj la jura helpo devas esti senpaga, ekzemple en ĉiuj kazoj koncerne postulojn por vivtenado aŭ koncerne kompensojn pro damaĝoj suferitaj pro invalidiĝo en la produktado. Senpage devas esti donita jura helpo en kunmetado de kiu ajn dokumento por la soldatoj. En Jugoslavio la kortumo povas rekoni al la partio, sub difinitaj kondiĉoj, la rajton senpage reprezentiĝi per advokato, se la partio ne kapablas efike defendi siajn proprajn interesojn kaj se ĝi ne havas rimedojn por pagi la kostojn de la advokato kaj entute de la proceso. En Jugoslavio ekzistas ankaŭ specialaj kazoj, kiam difinitaj partioj devas esti reprezentitaj de persono havanta la menciitan advokatan aŭ juĝistan ekzamenon. Ekzemple, antaŭ la duagrada ekonomiaj kortumoj aŭ antaŭ la Supera Ekonomia Kortumo la reprezentanto de la partio devas havi tian kvalifikon. Sed tiu persono povas ankaŭ ne esti advokato.

En la kriminalaj kazoj la leĝoj de ambaŭ landoj antaŭvidas ke akuzitoj pro pli gravaj kategorioj de krimoj devas havi juran helpon de advokato. Se la akuzito ne povas pagi la kostojn, li ricevos senpagan reprezentanton. La advokato en Jugoslavio povas reprezenti la akuziton ankaŭ en la antaŭprocesa esplora proceduro. La granda reformo de la kriminala juro de decembro 1958 largigis tiurilate la rajtojn de la sovetaj advokatoj, kaj nun ili rajtas partopreni en la antaŭprocesaj laboroj ekde la momento, kiam finiĝis la antaŭesploro kaj kiam la akuzito estis informita pri la konkreta akuzo. En Soveta Unio kiel defendantoj estas allasataj ne nur advokatoj, sed ankaŭ la reprezentantoj de profesiaj organizaĵoj, sindikatoj kaj aliaj "sociaj organizaĵoj". En Jugoslavio, kiam la defendo pere de advokato estas deviga, nur advokatoj povas funkcii kiel defendantoj. Sed ekster tiu kazo ĉiu ajn civitano - kun la escepto de konataj t.n. "pseŭdoskribistoj" - povas funkcii kiel rajtigito de la partio en kiu ajn proceso.

#### 4. H o n o r a r i o j .

En Soveta Unio kaj en Jugoslavio ekzistas specialaj tarifoj, fiksitaĵoj de la ŝtataj aŭtoritatoj. La diferenco estas, ke en Soveta Unio la partio pagas al la jura konsultejo, de kiu la advokato ricevas sian pagon surbaze de tre komplika sistemo, prenanta en konsideron diversajn faktorojn /kvalifikaĵojn, longecon de la praktikado, komplikecon de la kazo ktp./, dum en Jugoslavio la partio pagas al la advokato rekte. La enspezoj de la advokatoj en Soveta Unio nun varias, laŭ la oficialaj informoj, inter proksimume 700 kaj 1.700 rubloj monate. En Jugoslavio la enspezoj tregege varias kaj, ĝenerale parolante, la profesio ebligas vivon sur relative alta nivelo.

#### 5. O r g a n i z a ĵ o j .

En Soveta Unio la advokatoj estas organizitaj en advokataj kolegioj laŭ la regionoj, teritorioj kaj respublikoj. En Jugoslavio, por ĉiu respubliko kaj por la Provinco Vojvodina ekzistas po unu advokata ĉambro kiel organizaĵo bazita sur la principo de la t. n. "socia memadministrado" de la advokatoj. La ĉambroj estas organizitaj en la Ligo de Advokataj Ĉambroj. En Soveta Unio la kolegioj de advokatoj kreas en diversaj lokoj la jam preparolitajn "jurajn konsultejojn", en kiuj laboras pluraj advokatoj, administrataj de direktoro, kiun nomas la prezido de la koncerna kolegio.

#### 6. S o c i a p o z i c i o .

Ĝi ankoraŭ estas tre malbona en Soveta Unio, kion montras ankaŭ la enspezoj de la advokatoj en tiu lando. En la lastaj jaroj en la sovetaĵaj juraj revuoj aŭdiĝis multaj voĉoj pledantoj por plibonigo de la kvalito de la advokatoj, por pli grandaj fakaj kvalifikaĵoj, plilongigo de la deviga praktikado kaj ĝenerale por plialtigo de la socia pozicio. En Jugoslavio la socia pozicio de la advokatoj estas konsiderinde pli alta ol en Soveta Unio, sed kompreneble ankaŭ tie la reputacio de iu advokato dependas de lia persona kapablo, fakaj scioj, kurajo kaj honesteco.

Prof.Dro Ivo Lapenna  
- Wembley -

### LA ŜTATANECO EN LA JURO DE FINNLANDO.

Leĝo de 9.5.1981.

#### 1/ Akiro de ŝtataneco baze de naskiĝo aŭ alie rekte laŭ leĝa kaŭzo.

Baze de naskiĝo akiras ŝtatanecon:

a/ infano de geedzoj, kies patro havas finnan ŝtatanecon,

b/ infano de geedzoj, kies patrino havas finnan ŝtatanecon kaj kies patro ne havas ian ajn ŝtatanecon kaj kiu ne akiras baze de naskiĝo ŝtatanecon de iu alia ŝtato, kaj

c/ infano naskita ekster geedzeco, kies patrino havas finnan ŝtatanecon.

En la finna juro validas la principo, laŭ kiu la infano naskiĝante akiras ŝtatanecon de la gepatroj /jus sanguinis/.

En Finnlando trovita infano havas finnan ŝtatanecon, ĝis kiam estas konstatite, ke la infano havas ŝtatanecon de fremda ŝtato.

Eksterlandano, kiu geedziĝas kun finnlandano, akiras geedziĝante finnan ŝtatanecon.

Kiam la geedzoj havas infanon, kiu naskiĝis antaŭ la geedzeco, la infano akiras finnan ŝtatanecan, se ĝi ne geedziĝis kaj ne ankoraŭ fariĝis 21-jara.

Eksterlandano povas laŭ sia peto akiri finnan ŝtatanecan:

a/ se li jam fariĝis 21-jara,

b/ se liaj ordinaraĵoj loĝejo kaj hejmo dum la lastaj kvin jaroj situas en Finnlando,

c/ se lia vivmaniero konate estis neriproĉbla kaj

d/ se li estis kaj supozeble daŭre estos kapabla zorgi pri la vivtenado de si mem kaj sia familio.

Geedzoj povas esti aprobitaj kiel finnaj ŝtatanoj nur laŭ peto komune farita. Tamen unu el la geedzoj, kiu estas eksterlandano, povas esti aprobita laŭ sia peto, se la alia el la geedzoj jam estas finna ŝtatanano aŭ se la geedzoj pro rompigitaj interrilatoj loĝas malkune aŭ se la alia forestis en nekonata loko dum tri jaroj kaj ankaŭ aliokaze, kiam aparte gravaj kialoj ekzistas.

Pli juna ol 21-jara eksterlandano, kies vivrimedojn oni konsideras garditaj, povas laŭ peto de sia kuratoro akiri finnan ŝtatanecan, se tio progresigas la unuecon de la familio rilate al la ŝtataneco aŭ se estas aparte gravaj kialoj je tio. Tamen persono, kiu jam fariĝis 18-jara, ne estu aprobita kiel finna ŝtatanano sen sia permeso.

Se la petanto pli frue havis finnan ŝtatanecan, se li geedziĝis kun finna ŝtatanano aŭ se la alia el la geedzoj, kun kiu li petas pri akiro de finna ŝtataneco, havis ordinaraĵojn loĝejon kaj hejmon en Finnlando dum la lastaj kvin jaroj aŭ cetere ekzistas aparte gravaj kialoj aprobi la petanton kiel finna ŝtatanano, estas permesate doni al li finnan ŝtatanecan, kvankam la petanto ne havis ordinaraĵojn loĝejon kaj hejmon en Finnlando dum la lastaj kvin jaroj. Se estas gravaj kialoj, estas permesate aprobi la peton de antaŭa denaska finna ŝtatanano, kvankam li ne kapablas aŭ supozeble ne daŭre kapablos zorgi pri la vivtenado de si mem kaj de sia familio.

Kiam oni aprobas peton pri akiro de finna ŝtataneco, oni devas starigi kondiĉon por akiro de ŝtataneco, laŭ kiu la petanto antaŭ difinita limtempo liberiĝis el fremda ŝtataneco, se li ne povis atesti, ke li per akiro de nova ŝtataneco rekte liberiĝas el ŝtataneco de fremda ŝtato.

Kune kun siaj gepatroj, se aparte gravaj kialoj ne kaŭzas alion, akiras finnan ŝtatanecan en geedzeco naskita infano, kiu ankoraŭ ne fariĝis 21-a jara, kiu ne geedziĝis, kiu loĝas en Finnlando kaj pri kiu la gepatroj zorgas. Se nur unu el la geedzoj akiras finnan ŝtatanecan, akiras ankaŭ la menciita infano, pri kiu li zorgas, kune kun li la ŝtatanecan. Ekster geedzeco naskita infano sekvas laŭ samaj premisoj sian patrinon.

Petskribo por akiri ŝtatanecan devas esti adresita al la Prezidanto de la Respubliko kaj endonita al la kancelario de la registaro aŭ en kelkaj kazoj al finna ambasadorejo aŭ konsulato eksterlande. Dum la proceduro respektiva gubernia oficejo esploras, ĉu ekzistas sufiĉaj kaj laŭlegaj premisoj por aprobi la peton. Positiva decido de la Prezidanto validas nur post kiam ĝi antaŭ difinita limtempo estas registrita en la oficejo de respektiva gubernio.

## 2/ Perdo de finna ŝtataneco.

Finna ŝtatanano, kiu laŭ peto akiris ŝtatanecan de fremda ŝtato, perdas sian finnan ŝtatanecan. Se finna ŝtatanano alimaniere akiras ŝtatanecan de fremda ŝtato, li perdas la finnan ŝtatanecan, se liaj ordinaraĵoj loĝejo kaj hejmo situas ekster Finnlando. Se li loĝas en Finnlando, li perdas la ŝtatanecan transloĝigante eksterlanden.

Kaze de milito povas 17-39 -jara finnlandano, kiu pro malsano ne estas por ĉiam liberigita el militservo, nur per decido de la Prezidanto de la Respubliko perdi sian finnan ŝtatanecon.

Kiam finnlandano akiras ŝtatanecon de ŝtato, kies ŝtatanecon lia denaske eksterlanda edzino havis antaŭ la geedziĝo kaj kiun ŝi kune kun sia ŝtataneco ankoraŭ havas, aŭ kiam denaske eksterlanda edzino de finnlandano, kiu edzino ne perdis la ŝtatanecon de sia antaŭa ŝtato, post eksgeedziĝo denove geedziĝas kun ŝtatano de sia antaŭa ŝtato, la edzino perdas sian finnan ŝtatanecon.

Se persono, kiu denaske havas ŝtatanecon kaj de Finnlando kaj de fremda ŝtato, ne havis ordinarajn loĝejon kaj hejmon en Finnlando kaj kiu ne faris aŭ komencis fari ordinaran militservon aŭ minimume dum du jaroj estis lernanto en finn- aŭ svedlingva lernejo en Finnlando kaj kiu ne havis tian kontakton kun tiu ĉi ŝtato, kiu evidentigas la apartenon al Finnlando, li perdas sian finnan ŝtatanecon fariĝante 22-jara, se li tiam havas ŝtatanecon de fremda ŝtato. Kiam finnlandano tiamaniere perdas sian finnan ŝtatanecon, perdas ĝin ankaŭ lia denaske eksterlanda edzino, se ŝi tiam havas ŝtatanecon de fremda ŝtato.

Finna ŝtatano, kiu jam havas ŝtatanecon de fremda ŝtato aŭ kiu penas havigi al si ŝtatanecon de fremda ŝtato, povas laŭ peto esti liberigita el sia finna ŝtataneco. Se li ankoraŭ ne akiris ŝtatanecon de fremda ŝtato, la liberigo validas nur, se li antaŭ difinita limtempo akiris ŝtatanecon de fremda ŝtato. Se la petinto loĝas en Finnlando, li perdas sian finnan ŝtatanecon, se li antaŭ difinita limtempo transloĝiĝis eksterlanden.

Perdo de ŝtataneco kaŭze de administra decido ne estas ebla en Finnlando.

### 3/ Rajtoj de ŝtatanoj en la kvin nordaj landoj.

La nordaj ŝtatoj Danlando, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedujo faris inter si kontraktojn, kiuj garantias al iliaj ŝtatanoj en kelkaj kazoj reciproke la samajn rajtojn en ĉiuj supre menciitaj ŝtatoj. Ekzemple: rajto vojaĝi el unu lando en alian sen pasporto, rajto sen permeso labori en kiu ajn el la nordaj landoj.

Erik Gadd  
Juĝisto, - Imatra -

## LA ŜTATANECO EN LA JURO DE FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANUJO.

La baza leĝo pri germana ŝtataneco datiĝas de la jaro 1913. Ek de tiam multo ŝanĝiĝis kaj pro tio la leĝo ofte estis ŝanĝita per leĝoj, dekretoj kaj per la Federacia Konstitucio. Do, se vi posedas malnovan tekston, ne miru ke la nuna ŝtato estas ofte tute alia.

### 1/ Akiro de ŝtataneco

a/ Laŭleĝaj kaŭzoj.

Normale germana ŝtataneco estas akirita per deveno:

Edzeca infano de germana patro havas germanan ŝtatanecon, same needzeca infano de germana virino. Eksterlandano kiu edziniĝas kun germano akiras germanan ŝtatanecon, se la geedziĝo okazas en la FRG kaj se ŝi deklaras en la geedziga akto, ke ŝi volas ricevi germanan ŝtatanecon. Se ĝi pro iuj kaŭzoj ne fariĝis germana ŝtatano tiamaniere, ŝi rajtas ankaŭ post la geedziĝo postuli germanan ŝtatanecon. La koncerna instanco devas doni al ŝi germanan ŝtatanecon sen iu antaŭkondiĉo kaj senpage.



b/ Akiro laŭ peto /naturalizo/.

Alie ol la liberalaj reguloj pri restado de eksterlandanoj en la Federacia Respubliko Germanujo la normoj pri naturalizo estas relative severaj pro la granda numero de eksterlandanoj petantaj pri tio. Ekzistas diversaj antaŭkondiĉoj. La ĉefaj estas la jenaj:

- 1/ 10-jara restado en Germanujo
- 2/ Senripoĉa konduto
- 3/ Propra loĝejo en la FRG
- 4/ Kapableco mem zorgi por si kaj siaj familianoj
- 5/ Sufiĉe bona scipovo de la germana lingvo.

Tio ne signifas ke eksterlandano plenumanta la jenajn antaŭkondiĉojn nepre havas rajton pri naturalizo. Povas esti, ke oni malakceptas lian peton pro aliaj kaŭzoj. Pro esceptaj kialoj naturalizo povas okazi se mankas iuj el la supre menciitaj antaŭkondiĉoj, ekz. se eksterlanda edzo de germana ŝtatanino petas pri tio. Personoj, de kiuj estis forprenita germana ŝtataneco pro rasaj, politikaj aŭ religiaj kaŭzoj en la jaroj 1933-1945 havas rajton ricevi germanan ŝtatancon sen antaŭkondiĉoj; la samo validas por la idoj de tiu ĉi personoj.

## 2/ Perdo de ŝtataneco.

a/ Laŭlegaj kaŭzoj.

- 1/ Ĉiu germana ŝtatano rajtas peti, ke li estu senigita de la germana ŝtataneco, se li volas daŭre restadi en eksterlando; esceptoj ekzistas pri viroj, kiuj devas deĵori en la armeo kaj pri ŝtatoficistoj antaŭ sia eksigo el la ŝtatservo. La senigo el la ŝtataneco ne validas, se la koncerna persono post unu jaro ankoraŭ havas domicilon aŭ restadejon en Germanujo.
- 2/ Germano, kiu ne havas domicilon aŭ daŭran restadejon en Germanujo kaj kiu laŭ sia peto ricevas eksterlandan ŝtatancon, perdas sian germanan ŝtatancon; tio rilatas nur al akiro de eksterlanda ŝtataneco laŭ peto, ne pro aliaj kaŭzoj.
- 3/ Germano aŭ germanino ne perdas sian ŝtatancon pro geedziĝo kun eksterlandano aŭ eksterlandino.

b/ Perdo pro administracia decido ne plu estas ebla laŭ la Federacia Konstitucio.

## 3/ Reguloj pri familioj.

Naturalizo validas ankaŭ pri la infanoj pri kiuj la naturalizita persono havas laŭlegan reprezentorajton, escepte la filinoj kiuj jam estas edzinoj. Pri tio povas okazi esceptoj, sed tio estas neŝatata.

## 4/ Reguloj pri duobla ŝtataneco.

Reguloj pri duobla ŝtataneco ne ekzistas. Do, se germana ŝtatano havas ankoraŭ alian ŝtatancon, li havas la samajn rajtojn kaj devojn kiel alia germana ŝtatano. Tamen, la fakto ke li havas ankoraŭ alian ŝtatancon estas respektata.

## 5/ Aliaj problemoj.

La Federacia Respubliko Germanujo rigardas ĉiujn germanojn kiel siaj ŝtatanoj, ankaŭ se ili loĝas en orienta Germanujo.

## 6/ Ĝenerala signifo de ŝtataneco.

La ĝenerala signifo de la ŝtataneco ne estas tiel granda kiel antaŭe. Laŭ la Kontrakto pri la Fondo de la Eŭropa Ekonomia Komunumo ŝtatanoj de la membroŝtatoj havas en ĉiu membroŝtato rajton pri libera restado kaj laboro. La lastaj

limigoj tiurilate malaperos en 1969. Do, eksterlandanoj el la membroŝtatoj havas la samajn ekonomiajn kaj socialajn rajton kiel enlandanoj, sed ne la politikajn rajton /elekti, kaj esti elektata ktp./. Similajn rajtojn havas ankaŭ eksterlandanoj sen hejmlando kiu loĝis jam je la 30.6.1950 en la Federacia Respubliko Germanujo.

Dro Ludwig Röhl  
notario  
- Höchstädt -

### LA ŜTATANECO EN LA JURIO DE HUNGARIO.

Ŝtataneco estas jura interrilato. Ĉe unu flanko estas la ŜTATO, kaj ĉe alia flanko estas la CIVITANO. Tiu jura interrilato signifas la apartenon al ligiteco de iu difinita ŝtato. En tiu jura interrilato, unu subjekto estas sub potenco de alia subjekto. La unuan, ankaŭ en tiu kazo ŝargas mem la devigiteco, se li forlasas la teritorion de la dua, eĉ la unua povas pretendi tiajn rajtojn de la ŝtato, kiujn ĝi ne estas deviga garantiĝi por tiuj, kiuj ne estas en tia jura interrilato. La civitano povas havi la rajtojn, garantiitajn per la ŝtato, kiu ĝuas la protekton, ankaŭ trans la landlimo de ŝtato kaj devas fari la plenumojn de la legitimaj devigitecoj.

La Leĝo No V. de jaro 1957 rezumas la rajton pri hungara ŝtataneco. Krome aliaj juroreguloj aperis pri ĝia plenumado. Ni devas konstati, ke tiuj juraj disponoj pruvigis temporezistaj, ĉar ilin oni ne devis kompletigi, nek modifi.

#### 1./ Akiro de ŝtataneco

a./ La bazo de akiro de la ŝtataneco povas esti: 1./ laŭsanga principo -ius sanguinis-, kiam la ŝtataneco de la gepatroj decidas tiun de la idoj, 2./ laŭteritoria principo -ius soli-, laŭ kiu, la naskiĝo sur teritorio de iu ŝtato, decidas la ŝtatanecan.

b./ laŭ peto estas akirebla la ŝtataneco per naciigo. Ĝia kondiĉo estas: se la domicilio de ne-hungara civitano, antaŭ la naciiga peto, senĉese dum tri jaroj -objektiva kondiĉo- estas en Hungario kaj lia naciigo por intereso de la ŝtato ŝajnas ne esti malavantaĝa -subjektiva kondiĉo-.

Senkondiĉe la antaŭan domicilon, laŭ sia peto, estas naciigebla tiu persono, kiu en tempo de la peto, loĝas en Hungario, aŭ volas ekloksidiĝi kaj a./ lia ascendulo estis hungara ŝtatano, aŭ b./ lian naciigon faras motiva iu speciala cirkonstanco.

#### 2./ Perdo de ŝtataneco

neniam povas okazi aŭtomate.

a./ Je peto estas delasebla tiu persono el la hungara ŝtataneca interrilato, kiu 1./ ne havas ŝuldon en imposto, aŭ en alia publika debeto, 2./ ne estas dum kriminala procedo, aŭ dum validado de kriminala juĝo, 3./ ne atestas sian fremdlandan ŝtatanecan, respektive ties versaĵnecon.

Estas menciinde, ke per unuflanka rezigno pri ŝtataneco, neniu povas eligi el la ŝtataneca interrilato. Al tiu deziro estas bezona ankaŭ la aprobo de plej supera ŝtatpotenca organo. Eĉ tiuj personoj, kiuj kontraŭjure foriris al eksterlando, ne perdas sian ŝtatanecan.

Okaze de prijuĝo de la perdolasa peto estas prezindaj motivoj: 1./ la stato de geedziĝo; kun fremdlanda civitano, de la petiĉulo, 2./ se unu partio de la geedzoj estas fremdlanda civitano kaj oni edukas en eksterlando la infanon, 3./ se la delasotan ne-plenaĝulon adoptis fremdlanda civitano kaj la infanon oni

edukas en eksterlando., 4./ se la peticiulo akiris sian hungaran ŝtatanecon per geedziĝo kaj ĝi ĉesis.

La valido de la delaso koncernas nur la peticiulon.

b./ Perdo de la ŝtataneco povas esti ankaŭ per evikcio, se la persono restas kontraŭjure en eksterlando. Kromaj premisoj: 1./ se li grave pekis kontraŭ la ŝtataneca fidelo, 2./ se li pro grava krimago estas jurvalide kondamnita per hungara aŭ fremdlanda tribunalo.

La valido de evikcio ne ampleksas al alia partio de la geedzoj kaj infanoj, escepte se ili en eksterlando kontraŭjure restas kaj pri tiu la decido aparte disponas.

La decidon pri tiu evikcio oni devas en la hungara Ŝtata Oficiala Bulteno publikigi.

c./ La ŝtatanecon oni ne perdas, se li por konstanta eklokigo, per valida pasporto, foriras la landon.

### 3./ Reguloj pri familianoj

Per fakto de geedziĝo oni aŭtomate ne povas akiri ŝtatanecon. - La morto aŭ ties deklaro, de unu partio de la geedzoj, aŭ separo, aŭ aparta vivo ne impresas la estiĝon, aŭ perdon de la hungara ŝtataneco.

En la procedo de pridelasa peticio, se en la familio estas ne-plenaĝulo, oni devas persone aŭskulti ankaŭ tiun partion de la gepatroj, kies inspekto, tial paŭzas, ĉar la infano estas en prizorgo de alia partio aparte viva aŭ estas la infano dum tutelo de prizorga instituto.

Per fakto de geedziĝo oni ne povas aŭtomate perdi sian ŝtatanecon. Se hungara ŝtataneca virino geedziĝas kun fremdlanda civitano - fremdlanda ŝtataneca viro - tiuokaze ŝi ne perdas sian hungaran ŝtatanecon.

La ne-plenaĝa infano - laŭ principo de origino - ĉiam estas hungara civitano. Ĉe okazo de morto, de deklaro de la morto, de separo kaj de aparta vivado de la gepatroj, li restas hungara civitano.

Plenaĝa infano per familijura aranĝo per posta geedziĝo de la gepatroj ne ricevas hungaran ŝtatanecon, okazo de mala deklaro.

La adoptita infano per adoptado aŭtomate ne ricevas kaj ne perdas la hungaran ŝtatanecon.

La infanoj de senpatrolandaj gepatroj loĝantaj en Hungarujo, estiĝas je hungaraj civitanoj.

En Hungarujo trovita aŭ edukata infanoj, se iliaj gepatroj ne estas konataj, laŭ la teritoria principo, ili estas konsiderindaj kiel hungaraj civitanoj.

La adoptadon de fremdlanda civitano nur tiuokaze povas aprobi la kuratora instanco, se la ne-plenaĝulo jam estas naciianigita.

### 4./ Reguloj pri duobla ŝtataneco

La kondiĉojn de akiro kaj perdo de la ŝtataneco malsame reguliĝas pro diversa principa fundamento, en la juro de ĉiu stato. Do, ĝuste tiel povas esti, ke ili kolizias. Tiel rezultigas la duobla ŝtataneco. Do, estas konata tiu jurinstitucio en tiu kazo, ke iu persono, dum sama periodo, povas esti ano de du, eĉ ankaŭ de pluraj ŝtatoj. Tiun hungaran civitanon, kiu samtempe estas ano ankaŭ de alia ŝtato, ĝis tiam oni devas konsideri lin je hungara civitano, dum li per delaso aŭ per evikcio ne perdas sian ŝtatanecon. /P.e. iu laŭ devena rajto, do per naskiĝo samtempe akiras plurajn ŝtatanecojn, aŭ per devena rajto de sia naskiĝloko akiras ankaŭ fremdlandan ŝtatanecon/.

Tiu persono, kiu ne perdis sian hungaran ŝtatanecon kaj estiĝis ano de alia lando, havas duoblan ŝtatanecon. Tiuj personoj havas samajn rajtojn kaj devigite-

cojn, kiujn havas sole nur hungaraj civitanoj.

Ofte okazas, devene el la malsama jura reglamentado de diversaj landoj, ke per fakto de geedziĝo, la edzino povas akiri kaj perdi sian ŝtatanecon laŭ lia edzo.

#### Interŝtataj kontraktoj.

Hungara leĝo pri ŝtataneco eldiras, ke la disono pri ŝtataneco de la internacia kontrakto ankaŭ en tiu kazo estas valida, se ĝi diverĝas de hungara leĝo. La faritaj interŝtataj kontraktoj ĉesigis la duoblan ŝtatanecon. Tiaj kontraktoj fariĝis kun Rumanio en 1949, kun Sovetunio en 1958 kaj 1963, kun Bulgario en 1959, kun Ĉeĥoslovakio en 1961, kun Pollando en 1963.

Do, en tiu kazo, se tiu persono, havanta duoblan ŝtatanecon, loĝas sur la teritorio de tiu ŝtato, kies ŝtataneco li ne deziras havi, tiun deziron li devas deklari ĉe la instanco de tiu ŝtato, kies ŝtataneco li elektas. La kontrakto farita kun Sovetunio, krome eldiras, ke neniu ŝtato povas naciigigi la anon de alia ŝtato, sen permeso de kompetenta instanco.

Hungario aliĝis al internacia konvencio farita en 1957 en New York, pri ŝtataneco de edzinoj. Laŭ tiu konvencio, la geedziĝo, aŭ divorco kaj alia ŝanĝo en ŝtataneco de la edzo ne efikas la ŝtataneco de edzino. Hungarulo deklaris tiun aliĝon per Leĝo No 2 de 1960.

#### 5./ Procedaj organoj

a./ La peton pri ŝtataneco oni devas doni al la ministerio pri internaj aferoj, en eksterlando al la eksterlanda reprezentado de Hungara Popolrespubliko, kiu prezentas ĝin al la Prezidanta Konsilio de la Ŝtato.

Do, la Prezidanta Konsilio de la Ŝtato 1./ decidas pri la naciigo kaj renaciigo, krome pri la delaso kaj evikcio. 2./ disponas pri konfisko de tuta aŭ aparta havaĵo de la evikciito de ŝtataneco. 3./ Pri la plenumo de la peto pretigas ties dokumenton, kiu devas enhavi ankaŭ tiujn familianojn, kiujn rilatas la naciigo, renaciigo. En tiu kazo, se la enhavo de tia dokumento ne estas ĝusta, tiam oni povas peton endoni al la Ĉefurba Kortumo, kiu estas kompetenta pri la decido.

La naciigito kaj renaciigito devas antaŭ la prezidanto de la plenumkomitato de loka konsilio kompetenta laŭ domicilio de la peticiulo, fari ŝtatanecan ĵuron.

Pri la delaso, la Prezidanta Konsilio pretigas dokumenton.

#### b./ Ministerio Por Internaj Aferoj

a./ pretigas la dokumenton -akton- pri estiĝo kaj ne-estiĝo aŭ pri perdo de ŝtataneco. Se la legitimo havas erarojn, en tiu kazo, kontraŭ la decido oni povas apelacii ĉe la tribunalo, b./ opinideklaras pri peto de oficialaj instancoj kaj organizoj, c./ prezentas proponon en aferoj de naciigo kaj de renaciigo.

c./ Ministerio Por Defendo donas opinion kaj proponon pri peticio de delaso en tiu kazo, se la peticiulo estas 17-50-jaraĝulo.

d./ Ambasoderejo, konsulejo, okaze de en eksterlando donita peticio, la fremdlandaj organoj de Hungara Popolrespubliko donas informon. La peticion ĝi sendas per Ministerio Por Eksteraj Aferoj al Ministerio Por Internaj Aferoj./Se en la koncerna lando ne funkcias tia organo, en tiu kazo oni devas turni sin al la fremdlanda reprezentado, funkcianta en najbara lando./

e./ Ĉefurba Kortumo estas kompetenta decidi pri jura peticio en fakto-konstato rilate al ŝtataneca atesto.

f./ Speciala organo kaj prezidanto de la plenumkomitato de loka konsilio distrikta a./ farigas la ŝtatanecan ĵuron de naciigito kaj renaciigito, b./ donas informon en tiuj aferoj kaj sendas senpere la peticion al Ministerio Por Internaj Aferoj, c./ ĝia financa sekcio donas certifikaĵon pri stato de imposto de la petiĉulo.

g./ Publika Notario legitimas la deklaron en koncerne diversaj aferoj: a./ de abdiko pri la pretendo kontraŭ la hungara ŝtato, kontraŭ la hungara ŝtata organizo kaj entrepreno, b./ de deklaro de la petiĉulo, ke li ne estas sub valido de verdikto de hungara kriminala tribunalo kaj de kriminala procedo.

6./ Kostoj estas de lo forintoj ĝis 500 forintoj kiel tarifo, depende de la enhavo de la petiĉo kaj legitimo.

Dro Lajos Márton

- Budapest -

## ĜENERALAJ TEZOJ EL CIVILA KODO DE UKR. SSR.

### P r o m e s e s t i ĝ o

#### Nocio de la promeso kaj bazoj por ĝia estiĝo

Laŭ promeso unu persono - ŝ u l d a n t o - estas devigita por utilo de alia persono - k r e d i t o r o - plenumi difinitan agon, nome: transdoni havaĵojn, fari laboron, pagi monon ktp aŭ sindeteni de difinita ago kaj la kreditoro rajtas postuli de la ŝuldanto, efektivigon de lia ago.

La promesoj farigas el kontrakto aŭ el jene aliaj fundamentoj:

- el negocoj antaŭviditaj de la leĝo kaj ankaŭ el negocoj kvankam de la leĝo ne antaŭviditaj, tamen ĝin ne kontraŭstarantaj:

- el aktoj administraj, en ties nombro, por ŝtataj, kooperativaj kaj sociaj organizaĵoj, el aktoj de planado:

- rezulte de eltrovaĵoj, inventoj, raciaj proponoj, kreado de sciencaj, literaturaj kaj artaj verkoj:

- sekve de maluĉilo, kaŭzita al alia persono, kaj same pro akirado aŭ ŝparado de havaĵo je la konto de alia persono sen sufiĉaj por tio motivoj:

- sekve de aliaj agoj de civitanoj kaj organizaĵoj:

- sekve de eventoj, kiuj laŭleĝe kreas civiljurajn rezultojn.

#### Enhavo de la promesoj, devenantaj el la planadaktoj

Enhavon de la promeso, kiu sekvas senpere el la planadakto de popola ekonomio, determinas tiu ĉi akto.

Enhavo de la kontrakto, okazata surbaze de la plantasko, devas respondi al tiu lasta.

#### Kontraktado

La kontrakton oni konsideras estiĝinta, kiam la partioj por la ĝustaj kazoj en deca formo interkonsentis pri ĉiuj precipaj kondiĉoj.

Precipaj estas la kontraktkondiĉoj, agnoskitaj laŭleĝe, aŭ kiuj estas necesaj por ĉi specaj kontraktoj, kaj ankaŭ ĉiuj kondiĉoj, se pri tiuj laŭdeklare de unu el la partioj, la interkonsento estas atingita.

#### Formo de la kontrakto

Se la partioj interkonsentis kontrakti en difinita formo, la kontrakton oni konsideras okazita de tiu momento, kiam la kondiĉigita formo estas donita al ĝi, kvankam la leĝo tian por ĉi specaj kontraktoj ne postulas.

Se por la kontrakto laŭleĝe la skriba formo estas postulata -en la saman

interkonsentis la partioj- oni povas fari kontrakton ĉu per verkita kaj subskribita dokumento, de la partioj, ĉu per intersanĝo de leteroj, telegramoj, telefondepeŝoj k.t. p subskribitaj de la partio dum ekspedo. En kazoj, de la leĝo antaŭviditaj, estas kontraktebla per mendo, akceptita por plenumo.

La kontraktado laŭ propono, farita kun fiksita tempolimo por respondo

Kiam la propono por kontrakti, estas farita kun tempolimo, fiksita por respondo, la konsiderata kontrakto estas okazita, se la proponfarinta persono, pri ties akcepto, ricevis respondon de la alia partio, rilate al kiu, la kondiĉo estas observita.

La kontraktado laŭ propono, farita sen fiksita tempolimo por la respondo

Kiam la propono por kontrakti estas farita buŝe sen fiksita tempolimo por la respondo, oni konsideras la kontraktadon okazita, se pri ties akcepto, la alia partio senprokraste donis deklaron al la proponinta persono.

Se tia propono estas farita en skriba formo, oni la kontrakton taksas okazita kondiĉe, ke la respondo pri ties akcepto estas ricevita dum necesa tempodaŭro.

La respondo pri la konsento por kontrakti, ricevita kun malfruigo

Se el respondo pri la konsento por kontrakti estas videbla ĝia ĝustatempa ekspedo, tiu estas konsiderata kiel malfruiginta nur tiam, se la proponinta persono senprokraste sciigas la alian partion, ke la respondo estas ricevita kun malfruigo.

La respondon, en ĉi lasta kazo, oni taksas nova propono.

Respondo pri la konsento por kontrakti sub aliaj kondiĉoj

La respondo pri la konsento por kontrakti sub aliaj -kontraŭproponitaj- kondiĉoj estas konsiderata kiel rifuzo de la propono kaj samtempe kiel nove propono.

Se ĉe la kontraktfarado inter la ŝtataj, kooperativaj -krom kolhozaj- kaj sociaj organizaĵoj fariĝas malkonsentoj, kiuj estas prikonsiderindaj per arbitraco, la regulojn de la citita punkto oni ne aplikas.

Solvado de antaŭkontraktaj disputoj

Solvado de la disputoj, estigintaj antaŭ la kontraktfarado, bazita sur la deviga plantasko por ambaŭ partioj, inter la ŝtataj, kooperativaj -krom la kolhozaj- kaj aliaj sociaj organizaĵoj, estas solvataj respektive per arbitraco, se alian regulon ne fiksas la leĝo.

La disputoj inter la nomitaj organizaĵoj, kiuj estiĝas ĉe la kontraktfarado, ne bazita sur la deviga plantasko por ambaŭ partioj, estas solveblaj per arbitraco, se tio speciale estas antaŭvidita de la leĝo, aŭ pri tio interkonsentis la partioj.

Kontraktado por utilo de la tria persono

Se la kontraktinta persono el la kontrakto kondiĉis estigintan plenumadon de la promeso por la utilo de tria persono, tiun -la plenumadon- rajtas postuli ĉu la menciita partio, ĉu la nomita tria persono.

Kiam la tria persono rifuzis la rajton per kontrakto donita, la kontraktinta persono povas profiti ĉi tiun rajton, se tiu ne kontraŭdiras la sencon de la kontrakto.

Jozef Ŝnejder  
pens. jurkonsilisto  
- Ĥarkov -

PRI LA INTERNACIAJ AĈETOJ.

I.a./ La 3-an de aprilo 1964 oni por la unua fojo en la historio de Norvegujo donis leĝon koncerne nur internaciajn privatjurajn demandojn.

Estas malmultaj kampoj en la norvega juro kie oni havas tiel malmultajn konkretajn apogpunktojn kiel en la internacia privatjuro. La jura praktiko ne estas riĉa, kaj la literaturo ĝis nun estas tre modesta.

b./ Se oni deziras jurregulojn, kondukantajn al la sama rezulto senkonsidere en kiu lando la proceso estas pritraktata, du vojoj estas sekveblaj. Oni povas aŭ fari similajn materiajn regulojn sur la koncerna jurkampo, kiel ekzemple la nordaj landoj /Svedujo, Danujo kaj Norvegujo/ faris sur multaj kampoj kun bona rezulto. Aŭ oni povas doni egalajn regulojn pri la leĝelekto, por ke la samaj reguloj estu uzataj en la afero senkonsidere en kiu lando ĝi estos pritraktata.

Sur la kampo de la aĉetjuro oni provis ambaŭ vojojn. La Roma instituto por unueca privatjuro okupis sin pri egalaj leĝoj pri aĉetoj, sed ĝis nun la laboro ne kondukis al finaj praktikaj rezultoj.

Kontraŭe la laboro farita de la Haag-konferenco por internacia privatjuro havas pli grandan signifon, La Haag-konferenco akceptis entute 3 konvenciojn pri internaciaj aĉetoj de movebla propraĵo. Ili estas:

1./ Konvencio pri kiu leĝo oni aplikas kiam la aĉeto de moveblaĵoj havas internacian karakteron, finita la 15-an de junio 1955,

2./ Konvencio pri la leĝo aplikenda koncerne transprenon de la posedrajto per aĉeto de moveblaĵoj, se la aĉeto havas internacian karakteron, finita la 15-an de aprilo 1958,

3./ Konvencio pri juĝkompetenteco ĉe akceptita jurisdikcio en aferoj pri aĉeto de moveblaĵoj kiam la aĉeto havas internacian karakteron.

La unua el tiuj konvencioj kiu estas la bazo de la nun donita leĝo.

c/ Laŭ art. 9 de la konvencio ĝi validas kiam ĝi estas ratifita de almenaŭ 5 landoj.

La nordaj departamentoj por juraj aferoj opiniis, ke la nordaj landoj ne ratifu la konvencion antaŭ ol ĝi estis - aŭ tre verŝajne estos - ratifita ankaŭ de kelkaj landoj ekster la Nordo. Nun la konvencio estas ratifita de Italujo, Belgujo kaj Francujo, tial ke kiam ĝi nun estos ratifita de Norvegujo, Danujo, Svedujo kaj Finnlando, ĝi povos ekvalidi.

II a/ La ĉefregulo de la leĝo estas, ke la kontraktpartioj povas decidi kiun leĝon ili deziras apliki; § 3, unua artikolo. Tio ne signifas novaĵon koncerne la norvegan juron. La leĝo tamen enhavas pli fortajn postulojn rilate al la decido pri la leĝelekto ol nia jurpraktiko. La konsento pri la leĝelekto devas esti farita "en puraj vortoj" aŭ alimaniere esti "klare" laŭ la kontrakto. Pli frue oni supozis, ke elekto de juĝejudistrikto ankaŭ signifis elekton de kompetenta leĝo. Tia interpreto estas nekunigebla kun la nova leĝo. /Povas tamen esti, ke la elekto pri la juĝejudistrikto kune kun aliaj faktoroj tirantaj en la sama direkto, kaŭzas la konkludon, ke leĝelekto estas "klare" laŭ la kontrakto./

Ankaŭ ne konsento pri arbitraĵo en certa lando estas senpere egala al konsento pri elekto de la leĝo de tiu ĉi lando.

Ĝi malpli signifplene estas, ke certa lingvo estas uzata en la kontrakto.

b/ Aliflanke ne estas postulata laŭ la leĝo, ke la aĉeto devas havi ian interligon al la elektita leĝo por ke la leĝelekto estu valida. Norvega aĉetanto

kaj portugala vendisto rajtas decidi, ke ekzemple franca juro devas esti aplikata eĉ se la vendokontrakto havas neniun interligon al Francujo. Tio signifas pligon de la rajto pri leĝelekto kompare kun la ĝismuna jursituacio.

Sed la aĉeto devas havi interligon al pli ol unu lando, komparu § 1, - devas esti internacia aĉeto. Se du norvegoj konsentas pri livero de norvegaj artikoloj en Norvegujo, la leĝo tute ne estas aplikebla. La partioj ne rajtas decidi, ke ekzemple angla juro estu aplikebla. Ili ne povas per tia konsento eliri el la interna jursistemo.

c/ Laŭ § 3, dua artikolo, la demando, ĉu la interkonsento pri la leĝelekto estas liganta, devas esti decidata laŭ la leĝo de la preparolita lando. La kondiĉo por apliki tiun ĉi regulon estas memirite, ke oni el la kontrakto povas dedukti, ke certa leĝo estas elektita. Ĉu tio estas la kazo devas esti decidata per objektiva interpreto de la vortoj de la interkonsento laŭ ordinaraĵ interpretreguloj en la juĝejlando, kaj sub konsidero de la regulo en § 3, unua artikolo. § 3, dua artikolo, koncernas la problemon ĉu la interkonsento pri leĝelekto, kiu sendube evidentiĝas el la kontrakto, estas liganta por la partioj; due ĉu ĝi estas valida laŭ la reguloj pri malvalideco en la juro pri interkonsento. Ambaŭ tiuj demandoj devas esti decidataj laŭ la juro de tiu lando, kiun "la ekstera kadro" indikas.

La demando pri la leĝo de kiu lando devas esti decida por la valideco de la leĝelekto, estis unu el la plej pridiskutitaj dum la ellaboro de la konvencio, kaj estis nur post longedaŭra debato ke oni alvenis al la solvo kiu fine fariĝis la solvo de la konvencio kaj la leĝo. Decida estis lastinstance, ke la sistemo de la konvencio donis praktikan solvon de la problemo kaj solvon, kiu ne dependigis la procesrezulton de en kiu lando oni komencas la proceson. Ankaŭ la demando ĉu partio estas ligita de leĝelekto aŭ ne devas esti decidata laŭ jurreguloj de unu lando, kaj tiel longe la vortoj de la kontrakto ekeprese montras, ke la leĝo de unu lando estas akceptita, estas senkondiĉe praktika solvo decidi, ĉu la leĝelekto estas liganta laŭ la sama leĝo. Tiu sistemo rezultigas ankaŭ en tio ke la tuta proceso estas submetata la jurregulojn de la sama lando, kaj senkondiĉe tio estas avantaĝo.

Oni povas havi la impreson ke la regulo en § 3, 2-a artikolo faras certan limigon en la apliko de niaj reguloj pri Ordre Public. En la jurpraktiko estas ekzemple supozita, ke la reguloj en la norvega juro pri perfido devas esti aplikataj, eĉ se la juro de alia lando estas kompetanta.

Laŭ la formo kiun § 3, 2-a artikolo ricevis, devas esti klare, ke la fakto ke ekzistas perfido aŭ devigo en si mem ne estas sufiĉe por ke norvega juro devas esti aplikata rilato al la demando, ĉu la leĝelekto estas valida. Sed devas sekvi el niaj ĝeneralaj reguloj pri Ordre Public ke se norvega tribunalo pritrak-  
tas tian demandon, ĝi ne povas apliki la koncernan fremdan leĝon se montriĝas ke laŭ tiu leĝo perfido ne kaŭzas senvalidecon. La Ordre Public-vidpunkto devas kaŭzi, ke niaj tribunaloj verdiktas la interkonsenton malvalida konforme al niaj reguloj pri perfido. Tamen, tute senkondiĉe tiu ĉi regulo ne povas esti aplikata. Se la kontrakto ne havas alian interligon al Norvegujo ol tio ke unu el la partioj havas jurisdikcion tie, multe parolas por tio, ke la tribunaloj devas sin-  
garde apliki la Ordre Public-vidpunkton. La konsidero al apliko de samaj reguloj en la proceso senrigarde kie ĝi komencas, admonas al singardo sur tiu ĉi punkto.

d/ Eĉ se oni trovas la leĝelekton valida, ne estas certe ke ĉiuj eksterlandaj reguloj estos aplikataj. Unue la demando starigigas kiugrade eksterlandaj administraj reguloj devas esti aplikataj kiam ili havas signifon por la solvo de



la demando laŭ la interna juro de la koncerna lando. Ke la reguloj estas de publikjura karaktero ne estas en si mem sufiĉe por ke ili devus esti aplikataj de norvegaj tribunaloj. La leĝo ne distingas privat- kaj publikjurajn regulojn, kaj tia distingo ja ne estas necesa laŭ niaj ĝeneralaj leĝelektreguloj. Ĉu eksterlandaj leĝreguloj de publikjura karaktero devas esti aplikataj de niaj tribunaloj devas ĉefe esti decidata per interpreto de la koncerna fremda lando. La demando estas ĉu la koncerna leĝdecido celas reguli ankaŭ internaciajn aĉetojn, kaj ĉu ĝi laŭ ĝia propra enhavo estas taŭga por apliko ankaŭ de tribunaloj en aliaj landoj. Se oni trovas, ke ne estas necese pro tiuj kaŭzoj eviti ĝian aplikon, norvegaj tribunaloj devus uzi ĝin. Eĉcepto devas esti farata nur se la apliko de la koncerna leĝo sentofendos nian jurordon /§ 6/.

Aliflanke la demando elstaras kiongrade norvegaj jurreguloj havas tian amplekson ke ili devas esti aplikataj senkonsidere ke la leĝo de alia lando cetero estas aplikebla. Kiel elirpunkto tio devas esti determinata per interpreto de la koncerna norvega leĝregulo. Ĉu ĝi celas esti aplikata ankaŭ sur aĉeto de internacia karaktero, kaj kion fortan interligon devas la aĉeto eventuale havi por ke la regulo estu aplikebla? Pri aĉeto inter Norvegujo kaj alia lando la norvegaj reguloj pri valutpreskriboj ekzemple estas aplikeblaj. Ili koncernas ĉiujn mondevojn elstarantajn inter Norvegujo kaj la eksterlando eĉ se eksterlanda leĝo cetero estas la kompetenta. Aĉeto inter du fremdaj landoj tamen falas ekster la limoj de la reguloj.

e/ Kiam la leĝo konstatas ke la leĝelekto de la partioj estas decida por la juro de kiu lando, niaj tribunaloj devas apliki en la afero, tio signifas la internaj jurreguloj de la koncerna lando. Ke la leĝelektreguloj de la koncerna lando kaŭzas ke la tribunaloj de tiu lando aplikas la juron de alia lando, ludas nenian rolon. La leĝo, do malakceptas renvoi. Ĉi tio ne staras eksprese en la leĝo, sed estas antaŭvidita en la motivoj, kaj estas eksprese dirita en la teksto de la konvencio. La konvencio uzas en la artikoloj 2, 3 kaj 4 la esprimon " la loi interne ".

f/ La leĝo ne solvas la problemon kiam la leĝelekto devas esti farita por ke ĝi estu valida. La norvegaj motivoj ne tuŝas la problemon kaj laŭ tio kion mi povas vidi, ĝi ne estas pritraktata en la preparaj laboroj de la konvencio.

Verŝajne oni pensis pri interkonsentoj pri leĝelekto faritaj samtempe kun la aĉetkontrakto, sed la teksto de la leĝo ne malhelpas, ke ankaŭ interkonsentoj, faritaj pli malfrue povas esti validaj. La vortoj de § 3 tamen tiras en la direkto nur aprobi leĝelekton, faritan antaŭ ol la interkonsento pri aĉeto estas /aŭ devus esti/ plenumita. Tio estas verŝajne ankaŭ la plej natura solvo. La partioj havas legitiman bezonon por antaŭ la plenumo de la kontrakto povi interkonsenti pri la leĝo de kiu lando oni devas apliki. Ĉi tio povas nome havi signifon por la elekto de plenumloko. Sed kiam la disputo estas starigita, la leĝo ne plu estas ag-normoj. Ĝi havas nur signifon por la decido, ĉu tio kio jam estas farita, estas farita ĝustamane. La bezono por leĝelekto tiam ne ĉeestas samgrade.

III. Se la partioj ne faris validan leĝelekton, la ĉefregulo laŭ § 4 en la leĝo estas, ke la leĝo de la lando kie la vendisto estas loĝanta, devas esti aplikata. La leĝo de la lando de negoĉejo oni aplikas, se la vendisto ricevis la mendon de la aĉetanto sur tiu negoĉejo. Decido estas la loko, kie la vendisto havas loĝejon aŭ negoĉejon je la mendotempo. Ke li translokigas post tiu tempopunkto ne kaŭzas, ke alia leĝo fariĝas aplikebla.

Ke la leĝo kaj la konvencio decide akcentas la loĝejon de la vendisto estas natura por ni, sed por landoj kiuj cetero akcentas la naciecon kiel interliga

punkto, tio povas esti konsiderita kiel diverĝon de la cetera validaj reguloj. La leĝo kaj la konvencio tamen antaŭ ĉio celas al praktikaj solvoj de la leĝelaktdemandon, kaj devas esti evidente praktika emfazi decide la loĝojon. Estas de la loĝejo, ke la vendisto ordinare faras siajn negoctransakciojn kaj ne de la lando kie li estas ŝtatano. Por la aĉetanto ne estos granda surprizo, ke la leĝo de la lando kie la vendisto loĝas, estas aplikata, dum certe en multaj kazoj estos neatendita por li ke la leĝo de tria lando, lando pri kiu li eble apenaŭ aŭdis, estos aplikata pro tio ke la vendisto hazarde estas ŝtatano tie.

En la motivoj /p. 9/ estas dirite, ke la leĝo per loĝejo pensas pri la loko kie la koncerna persono loĝas stabile aŭ daŭre. Intertempa loĝejo ne sufiĉas.

Eĉ sen tiu indiko en la motivoj oni aplikas korespondan vidpunkton, ĉar ĉi tio estas konforme al la domicilprincipo en la juro.

Tamen, oni ne devas ekskluzivi, ke la postulo pri daŭreco de la restado povas varii de jurregiono al jurregiono.

Se estas dubo, ĉu la vendisto estas loĝanto en lando A aŭ lando B, ŝajnas ĝuste emfazi en kiu lando la vendo estas farita. Se ekzemple homo loĝas duonan jaron en Francujo kaj duonan jaron en Norvegujo, oni povas samrajte diri, ke li havas loĝojon en Francujo kiel en Norvegujo. Praktikaj konsideroj tiam parolas por tio, ke oni en rilato al § 4 de la leĝo konsideras lin loĝanta en la lando kie li restadis kiam la vendo estas farita.

/Nota: Apartaj problemoj elstaras kiam la vendisto estas jura persono. Ĉu oni tiam devas decide emfazi la lokon kie la asocio estas fondita, kie ĝi havas sian ĉefoficejon, aŭ eble la negocejon de kie la kontrakto estas farata? /La aŭtoro ne plu pritraktas tiujn problemojn./

IV. Esceptojn de la regulo, ke la leĝo de la loĝejo de la vendisto aŭ de la negocejo estas decida, ni havas, se la vendisto aŭ lia reprezentanto, ricevas la mendon en la loĝejo aŭ negocejo de la aĉetanto. Tiam la jurreguloj de la lando kie ĝi situas, devas esti aplikataj /§ 4, dua artikolo/. Ĉi tio signifas koncesion al la juro de la kontraktloko koncerne kiun oni malfacile povas fari gravajn kontraŭdirojn.

Decida por ke tiu ĉi regulo estus aplikebla estas, ke la vendisto aŭ lia reprezentanto ricevas la mendon en la lando de la aĉetanto. Ke la reprezentanto ne havas plenrajton fari ligantan interkonsenton en la nomo de la vendisto, estas sen signifo por la loĝelekto, se la aĉeto estas farita post kiam la reprezentanto ricevis la mendon de la aĉetanto. Ĉu la reprezentanto estas agento aŭ plenrajtulo, aŭ ĉu li havas daŭran postenon aŭ specialkomision ankaŭ ne havas signifon.

Ke la vendisto havas reprezentanton en la loko tamen ne sufiĉas. Se la mendo en tia okazo estas sendita direkte al la vendisto, oni aplikos la regulon en § 4, unua artikolo.

V. La leĝo de la kontraktloko devas ankaŭ esti aplikata, se la aĉeto estas farita en borsoj aŭ per aŭkcio. Tiu ĉi regulo estas konforme al antaŭaj opinioj en la literaturo. La leĝo ne difinas la konceptojn borsoj aŭ aŭkcio. Tiu ĉi demando devas esti decidata laŭ la juro de la juĝlando.

La juro de la kontraktloko ne estas aplikebla sur aĉetoj en butikoj, hotelinterkonsentoj kaj aĉetoj en foiroj. Kiam la leĝo limigas la aplikon de la juro de la kontraktloko al borsoj kaj aŭkcioj, oni ne povas fari pliampleksigan interpreton sur tiu ĉi punkto. Tiaj aĉetoj sekvas la ĉefregulon en § 4, unua artikolo, kondiĉe ke la kontraktloko ne estas en la lando kie la aĉetanto havas loĝojon aŭ negocejon. En la lasta okazo oni aplikas § 4, duan artikolon.

VI. La elirpunkto de la leĝo estas, ke se estas klare, ke leĝo en unu lando devas esti aplikata, la leĝo estas uzata en ĉiuj juraj konfliktoj, originigitaj de la aĉeto. La ordinaraj kontraktjuraj reguloj devas esti aplikataj same kiel la apartaj aĉetjuraj /komparu la motivojn p. 4/.

De ĉi tio la leĝo tamen faras kelkajn esceptojn. Laŭ § 2 certaj problemoj tute falas ekster la leĝo, nome la demando pri jura agpovo, la demando kiomgrade plenrajte aŭ simila donas povon fari ligantan kontrakton, la demando pri kontraktoformo, kaj la demando pri kiu efiko la aĉeto havas por aliaj ol la kontraktpartioj. Per tio ne estas dirita, ke la sama leĝo ne povas esti aplikata ankaŭ rilate al tiuj demandoj. Ĉi tio tamen ne sekvas eventuale de la leĝo, sed de aliaj reguloj. Pritrakti problemon kiun leĝon oni devas apliki en ĉiu el tiuj okazoj ne estas temo por ni tie ĉi.

Plue oni notu ke § 5 havas apartan regulon por tiu kazo ke la vendoobjekto devas esti ekspertizata. Tiam la leĝo de la lando kie oni faros la esploron, devus esti aplikata, kiam demando elstaras kiel la esploro devas esti farata, kaj ankaŭ koncerne sciigon pri la esploro, kaj kion faru se la vendoobjekto estas refuzata.

Ĉu esploro en tute devas esti farata, aŭ eventuale kie, devas esti decidata laŭ la leĝo kiu cetere estas kompetenta, aŭ eventuale la aparta interkonsento inter la partioj. La sama validas rilate al la demando kiun amplekson la esploro devas havi, kaj kiun efikon sekvas se esploro ne estas farita.

VII. Kial jam menciite estas antaŭkondiĉo por apliko de la leĝo, ke la aĉeto estas internacia. Tamen, eĉ ne ĉiuj el tiaj aĉetoj falas interne de la limoj de la leĝo.

Laŭ § 1 aĉeto de registrita ŝipo, boato aŭ aviadilo, kaj vendo de valorpaperoj aŭ vendo dum perforta plenumado aŭ per jurdecido de alia speco, falas ekster la leĝo.

Ke la leĝo ne koncernas vendon de bienoj, sekvas el § 1, unua artikolo, kiu limigas la aplikampon al moveblaĵoj. Aliflanke la leĝo ne eksplicite faras escepton por moveblaĵoj vendataj kiel akcesoraĵoj al bieno, ŝipo aŭ simila. Verŝajne la leĝo tie ĉi devas esti donata pli striktan interpreton, tiel ke moveblaĵoj vendataj kiel akcesoro al ĉefaĵo kiun la leĝo ne ampleksas, sekvas la samajn leĝelektregulojn kiel la ĉefaĵo.

Aldono: Leĝo de internaci-privatjuraj reguloj pri aĉeto de moveblaĵoj.

§ 1.

Tiu ĉi leĝo koncernas tiujn moveblaĵaĉetojn kiuj havas tian interligon al pli ol unu lando, ke ili estas konsiderataj kiel internaciaj aĉetoj.

La leĝo tamen ne koncernas aĉetojn de registritaj ŝipoj, boatoj aŭ aviadiloj aŭ de valorpaperoj kaj ankaŭ ne vendon dum perforta plenumado aŭ laŭ alia jura decido.

Interkonsento pri translasado de aĵoj kiuj unue devas esti produktataj, estas konsiderata kiel interkonsento pri aĉeto se la translasado devas havigi la necesajn krudaĵojn.

§ 2.

La leĝo ne koncernas

- a/ demandon pri la jura agpovo,
- b/ demandon ĉu aŭ kiomgrade rajtigo aŭ alia reprezentanto povas fari ligantajn aĉetojn aŭ vendojn,
- c/ demandon pri la formo de la interkonsento,
- d/ demandon pri la efiko de la aĉeto por aliaj ol la partioj /aĉetanto kaj vendisto./

§ 3.

La aĉeto staras sub la jurreguloj de tiu lando pri kiu la aĉetanto kaj la vendisto interkonsentis eksprese aŭ kiu alimaniere klare sekvas el la interkonsento.

La demando ĉu estas farita ligantan interkonsenton pri tiu, ke la aĉeto estas submetita la jurreguloj en certa lando, estas decidata laŭ la jurreguloj de la koncerna lando.

§ 4.

Se ne estas farita interkonsento kiel menciita en § 3, la aĉeto estas submetita la jurreguloj de tiu lando kie la vendisto havas loĝejon kiam li ricevis la mendon de la aĉetanto. Se la mendo estas ricevata en la negoĉejo de la vendisto, la aĉeto estas submetita la jurreguloj de la lando kie la negoĉejo situas.

Se la vendisto aŭ lia reprezentanto ricevis la mendon en la lando kie la aĉetanto havis loĝejon aŭ la negoĉejon de kie la mendo venis, la aĉeto estas submetita la jurreguloj de tiu ĉi lando.

Aĉeto en borso aŭ aŭkcio estas submetita la jurreguloj de la lando, kie la borso situas aŭ la aŭkcio estas farata.

§ 5.

La procedoj kaj la tempolimoj por esploro de la aĉetaĵo estas submetitaj la jurreguloj de la lando kie la esploroj devas esti farataj, se alie ne eksprese estas interkonsentita. La jurreguloj de tiu ĉi lando validas ankaŭ por sciigo pri esploroj kaj koncerne la procedon se la aĉetaĵo estas rifuzata.

§ 6.

Fremda jurregulo ne konforma al la norvega jurordo /l'ordre public/ ne povas esti aplikata laŭ tiu ĉi leĝo.

§ 7.

Tiu ĉi leĝo validiĝos de la tempopunkto kiun la Reĝo decidus. 1/ de 1.9. 1964 laŭ rezolucio de 3.4. 1964.

Hans Petter Lundgaard

univ. lektoro

- Oslo -

E V E N T O J D E I. E. A. J.

en kadro de la 52a Universala Kongreso de Esperanto en R o t t e r d a m.

1./ La Ĉefkunveno okazis en la kongresejo "De Doelen", en la teretaĝa salono Unesko, sabaton, la 5-an de aŭgusto 1967.

Ĉeestis 11 personoj el 8 landoj.

Malfermis la Ĉefkunvenon kaj prezidis la asocia prezidanto Prof. Dro I. Lapenna.

a./ Prof. Dro Lapenna laŭtlegis leteran raporton de la asocia sekretariokasisto Dro Röll, de 25.6.1967, pro lia foresto.

La kunveno akceptis la raporton de Dro Röll.

b./ Poste oni diskutis pri nia organo "Internacia Jura Revuo". Oni parolis pri la lingvo kaj la enhavo de la revuo. Prof. Dro Lapenna konstatis, ke la lingvo en la aperinta numero unua, parte estas malbona tiel, ke kelkaj frazoj estas nekomprenblaj: do, oni devus zorgi precipe pro tio, ke la lingvo fariĝu pli bona. Li proponis, ke la ĉeestanta Dro Bácskai el Budapeŝt interrilatu kun la redaktoro Dro Márton kaj kune kun la redaktoro zorgu pri bona lingvo, respektive stilo. Dro Bácskai deklaris sin preta interkontakti tiurilate kun Dro Márton kaj

volas subteni lin en tiu direkto.

La kunveno aprobis tion.

Pli poste oni denove pritraktis la lingvon kaj la enhavon de la Revuo, precipe ankaŭ la problemon, kiel oni gajnu bonajn kunlaborantojn kaj elektu taŭgajn temojn.

S-ro Harry proponis, ke oni eventuale dediĉu unu numeron al temo pri la homaj rajtoj.

c./ Sekvanta temo estis la fikso de novaj kotizoj. Laŭ propono de Prof. Dro Lapenna, la kunveno decidis: la jara kotizo por ĉiu membro de IEAJ inkluzive abonon al la Revuo estu de nun du usonaj dolaroj aŭ egalvaloro: la nura abono al la Revuo kostu unu usonan dolaron aŭ egalvaloron.

d./ Prof. Dro Lapenna proponis insiste, ke la membroj de IEAJ laŭeble fariĝu fakdelegitoj de UEA, pri juro, eventuale pri specialaj branĉoj de juro: tio estus grava por UEA ktp.

La kunveno konsentis.

e./ S-ro Harry parolis pri traduko de la Ĉarto de la Unuigintaj Nacioj. Li pretas kaj volas verki tradukon de la Ĉarto, kiu eble estu publikigita en 1968.

f./ Poste oni parolis pri la okazonta Publika Kunveno de nia Asocio. Oni opinias, ke oni ĉiuokaze aranĝu la kunvenon, kiu cetere en la kongreslibro estis jam anoncita por morgaŭ. Oni fiksis ankoraŭ detalojn pri tiu kunveno.

g./ Por Publika Kunveno de nia Asocio dum la Universala Kongreso 1968 en Madrid, oni proponis kaj akceptis kiel temon: "La rajto de kunveno kaj organiziĝo laŭ juro de diversaj landoj /okaze de la Jaro de la Homaj Rajtoj/". Sed tiu ĉi tem-formulo estu proksimuma aŭ provizora.

Decido: oni lasu la definitivan formuladon de la temo al Dro Röhl.

2./ Publika Kunveno de la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, okazis en la kongresejo "De Doelen", en la teretaĝa salono Unesko, dimanĉon, la 6-an de Aŭgusto 1967.

Ĉeestis 28 personoj. Estas konstatite, ke ĉiuj ĉeestantoj estis esperantistoj: juristoj kaj nejuristoj: do neniu neesperantisto partoprenis.

Malfermis la kunvenon kaj prezidis asocia vicprezidanto S-ro Stolpe. Li salutis la ĉeestantojn kaj donis kelkajn informojn por membroj kaj nemembroj, precipe pri celo kaj stato de nia Asocio.

Poste oni pritraktis la destinitan ĉeftemon de la kunveno: "La ŝtataneco en la juro de diversaj landoj".

Oni havis je dispono, koncerne tiun temon, skribajn raportojn de diversaj sinjoroj pri la juro de 10 diversaj landoj laŭ jena sinsekvo:

- de S-ro Goulding pri angla juro S-ro Harry,
- de S-ro Harry pri aŭstralia juro S-ro Harry mem,
- de S-ro Perko pri aŭstria juro Dro Perko mem,
- de S-ro Gadd pri finnlanda juro Dro Hermann,
- de S-ro Röhl pri federaci-germana juro S-ro Stolpe,
- de Dro Márton pri hungara juro Dro Bácskai,
- de Prof. Dro Lapenna pri soveta juro Prof. Dro Lapenna mem,
- de Prof. Dro Lapenna pri jugoslavia juro Prof. Dro Lapenna mem,
- de S-ro Pruszyński pri pola juro Prof. Dro Lapenna,
- de S-ro Høeg pri norvega juro S-ro Woessink.

Oni diskutis ion pri la temo. Interalie oni proponis, ke IEAJ dum la sekvonta tempo okupigu pri la juro de sano, higieno, asekuraj rajtoj k.t.p. en la diversaj landoj, precipe ankaŭ pri la sociaj rajtoj de eksterlandanoj en la diversaj landoj.

S E N K O M E N T A R I E

Ministerio Pri La Eksteraj Aferoj

J-45A/1967

Temo: Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj

K-don Dro Lajos Márton  
s e k r e t a r i o  
de Hungara Juristo-Asocio  
B u d a p e s t

Kara kamarado Márton!

Vian informon pri la Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kun danko mi konfirmas.

Sekve, ke la Departemento Por Internaciaj Organizoj de la Ministerio Pri la Eksteraj Aferoj transdonis la zorgadon pri internaciaj juristo-organizaĵoj al la Internacia Jura Sekcio, niaj interrilatoj en venonto fariĝas pli striktaj. En la Internacia Jura Sekcio k-do Dro István Sándor ricevis komision kiel raportanto por igi la interrilaton. Nature ankaŭ mi mem kaj mia anstataŭanto k-do Dro József Bényi konsilisto, laŭbezone iam ajn ni estas je la dispono de la Asocio.

Budapest, la 11-an de Novembro 1967.

Kun kamaradeca saluto  
Dro Endre Ustor  
ambasadoro  
Ĉefo de la Departemento

I N F O R M O P R I L A K O T I Z O J

La laborjaro de nia Asocio ne estas identa kun la kalendara jaro. Pro praktikaj kaŭzoj ĉiu laborjaro finigas kun la Universala Kongreso de Esperanto. La jarkotizo estas du usonaj dolaroj aŭ ties egalvaloro. Ĝi inkluzivas la abonon de la "Internacia Jura Revuo".

Kiel pagi?

Membroj en o k c i d e n t a j -pagipovaj- landoj al Dro Róll I-a sekr.-kasisto de IEAJ:

a./ Giro al lia propra nomo: okc.germana poŝtĉekkonto: "Postscheckamt München Nr. 1246 66".

b./ Internacia poŝtmandato

c./ Ĉeko

d./ Sendo de monbiletoj en letero. Ĉiuj valutoj estas akceptotaj, se temas pri sangebla mono.

e./ Internaciaj respondkuponoj. Por unu int.resp.kupono egalas 0.50 germ. markojn. /Do 16 int.resp.kup.egalas unu jarkotizon.

Membroj en o r i e n t a j -nepagipovaj- landoj konservu la jarkotizon ĝis la dispona sciigo de Dro Márton II-a sekr.- kasisto.

La nura abono al la "Internacia Jura Revuo" estas unu dolaro aŭ egalvaloro, /12 int.resp.kuponoj/ rekte de la redaktoro.

O P I N I O . . .

"La unua numero de "Internacia Jura Revuo" traktas fundamentan demandon el la familia juro: la principon de egalrajteco de la seksoj. Naŭ juristoj malsamnacaj priskribis en diversaj kontribuoj la kondiĉojn ĉi-rilatajn en ĝek landoj. La speciala faka valoro de la artikoloj ne povas ĉi tie esti prijugata. Ili reprezentas la ĉefajn detalojn el la legoj de diversaj landoj, tiel ebligante fari interesajn komparojn internaciajn. Do la artikoloj estas ankaŭ satataj de ne-juristoj, ankaŭ pro tio, ke ili pro siaj mallongecoj ne povas tro penetri en la profundecon de la speciala jura problemaro... Plua numero de la revuo estos atendata kun intereso."

/Interlingvistika Informa Servo/

"Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj povos pri ĉiuj interesaj por ĝi demandoj kontaktigi kun nia Komisiono, kiu estas konata por Vi. -Moskva K-9, prospekt. Kalinina 14.- Ni konatigis atente kun eldono de IEAJ "Internacia Jura Revuo" kaj opinias, ke ĝi estas vere valora informajo pri la legaro de diversaj landoj. Ni esperas, ke la revuo de IEAJ servas la pacon. La artikolon por tio ĉi, ni supozas sendi al Vi je la fino de 1967 - je la komenco de 1968."

A. Makovskij, Respondeca sekretario de la Komisiono pri internaciaj li-  
goj de sovetaĵ esperantistoj/

N i f u n e b r a s k a j k o n d o l a s

Tre aktiva membro de nia Asocio, S-ro A. Barbiellini Amidei /Italujo/ post mel-longa malsano forpasis nin.

En sia pli ol sepdek aĝo Dro I. Balla /Hungarujo/ post longtempa sufero mortis.

Iliaj memoroj restas inter ni.

### L I B R O B R E T O

En la socialismaj landoj kaj tiel ankaŭ en Hungarujo, daŭre kreskas la intereso al la socia, politika strukturoj de junaj ŝtatoj, des pli, ĉar ilia parto faras antiimperialisman politikon kaj ilia plimulto elektis la ne-kapitalisman vojon de la socia evoluo. Ilia signifo daŭre pliiĝas en la internacia politiko kaj tiel estas multoble evidenta la ekkono de ilia konstitucio, precipe pro tio, ĉar la konstitucioj plastike demonstras la sociajn interrilatojn kaj la internacian politikon de la opaj ŝtatoj, eĉ ili ankaŭ skizas la vojon de la evoluo.

La Ŝtat- kaj Jurscienca Instituto de Hungara Scienca Akademio intermite publikas en siaj eldonaĵoj la rezultatojn de la esplora laboro. La Jurkompara Sekcio de la Instituto nun denove riĉigas la jurisprudencan literaturon kaj kontentigas la longtempan pretendon de la praktiko kaj esplora laboro, per kompilo de serio de "Konstitucioj de novaj ŝtatoj".

La redaktoroj - Dro Gábor P u l a y kaj Dro PÁL S e b e s t y é n - konfirmiĝe al la karaktero de la temo, feliĉe elektis la taŭgan manieron de la pri-laboro kaj redaktado. Kie la laŭvorta publiko de la juroreguloj konvenis al la dezirita celo, tie ili tiun ĉi metodon elektis. Kiam kvankam ŝajnis malsufiĉa la senkomentaria kolekto de la juroreguloj, tiam ili analize prilaboris la materialon, grupigantan laŭ la plej gravaj vidpunktoj.

En la u n u a volumo de tiu serio oni publikas la tekston de konstitucioj de dek landoj, neantaŭlonge ankoraŭ koloniaj, tiuj nun jam estas independigitaj: Algerio, Cipro, Dahozeio, Ganao, Guineo, Kameruno, Malgasio, Malio, Maroko, Nigerio. La konstitucioj de tiuj landoj validis ĝenerale post jaro 1960.

La aŭtoroj interese pritraktas en la enkonduko karaktere plej komunajn trajtojn de la junaj ŝtatoj en Afriko. Interalie estis grava vidpunkto en ilia metodo, ke la konstitucioj de tiaj ŝtatoj estu en la volumo, kiuj estas en diversaj etapo de la socia kaj ekonomia evoluoj kaj kies historia paseo estas malsimila kaj nacieca konsisto ne estas sama. Same la aŭtoroj observis tiun elekton, ke la volumo egale prezentu la landojn estintajn ĉu franca, ĉu angla kolonioj kaj tiujn de la landoj, akiritan sian independecon ĉu per armilo, ĉu per paca maniero.

Estas tre utile, ke en la eldonaĵo, antaŭ la teksto de la konstitucio de ĉiu ŝtato, estas trovebla konciza rezumo pri historia, ekonomia, politika karakteroj de la koncerna lando. Krome, ĝi donas bonegan informon pri ilia geografio, surfaco, loĝantaro, etnografia konsisto kaj celadoj de la ekstera kaj enlanda politiko.

La plimulto de la nomitaj landoj liberigis el sub franca regado kolonia.

Estas kompreneble, ke tiuj ŝtatoj en pluraj rilatoj spegulas la francan efikon. Ekz.: la akcento de la principoj de suvereneco de la popolo kaj demokratismo. - Laŭ ĉiu konstitucio oni per ĝenerala elekto igas la parlamenton, kiu escepte la Malgasian Respublikon -Madagaskaro-, ĉiu estas unuĉambra sistema. Same, per elekto oni oficigas la respublikan prezidantecon. En ĉiu konstitucio havas distingindan lokon, la dispozo pri homaj rajtoj kaj politika liberecrajtoj. Rilate tiun, pluraj konstitucioj koncernas la Universalan Deklaracion pri Homaj Rajtoj fare de UN en j. 1948 kaj la Francan Deklaracion pri homaj rajtoj en j. 1789.

La signifajn trajtojn de la juĝista organizo skizas la plimulto de tiaj konstitucioj. La dispozoj akcentas la principon de la juĝista indepeneco kaj sub diversaj nomoj kreas Plej Superan Kortumon. Estas komuna karaktero en la nomitaj konstitucioj, la klopodo al garantio de centra plenuma potenco: ekz.: a./ en Malio, "raciigita kaj regulita sistemo de la parlamento, b./ en Dahomeio, "akcentita" sistemo de la respublika prezidanto, c./ en Malgasio, la kombino de punktoj a./ kaj b./, d./ en Guineo, eksplicite la sistemo de la respublika prezidanto.

La konstitucioj de landoj liberigintaj el sub angla regado kolonia -Cipro, Ganao, Nigerio-, ne donas tian saman unuecan bildon. Tiun montras la kompromisa solvo kun la reganta klaso de la donitaj teritorioj. La suverenecon akceptas ĉiu konstitucio, inter la fundamentaj dispozoj. La jura sistemo de angla Common Law kaj la juĝista organizo pli-malpli en ĉiu tri ŝtatoj validas. Sed, la amplekso de la firmigo de homaj rajtoj tre diferencas, eĉ ilia garantio ĝenerale mankas. Nepre estas menciinde, ke en la nomitaj konstitucioj, la rekono de egaleco de virinoj, ne estas. Supozeble ties kaŭzoj estas la gentaj kutimoj kaj religiaj motivoj. Speciale pozicias, kompare al ĉiu nomita konstitucio, la konstitucio de Cipro. Tiu ĉi ampleksa dokumento laŭvorte, esence ne estas konstitucio en burĝa, en socialisma racioj. Ĝi spegulas la kompromismon de la greka kaj turka komunumoj, loĝantaj sur la insulo. Sekve, tiu ĉi konstitucio detale pritraktas la demandojn de la nacieca leĝfarado, loka aŭtonomio, impostado, la publika servo, la naciecan dividigon de la lasta, krome detale donas la procedon de krimonala juro ktp. La konstitucio prezentas la rajtojn de la greka-ortodoksa kaj muzulma eklezioj.

Estas mia noto, ke eble oni sentas streĉa la envicigon de la konstitucio de Cipro, ne nur tial, ke ĝi en klasika esenco ne estas konstitucio, sed precipe pro tio, ĉar la historia paseo kaj kulturo de tiu ĉi ŝtato ege diferencas de la afrikaj ŝtatoj. Laŭ mia opinio estus estinta pli ĝusta, se je deka estus enteniginta en la volumo, la konstitucio ankaŭ de afrika ŝtato, de tiu ŝtato, kiu same ne-antaŭlonge akiris sian indepencon kaj en la internacia vivo faras gravan rolon, p.e. la konstitucio de Unuiganta Araba Respubliko.

La dua volumo -fare de samaj aŭtoroj- de la serio enhavas la konstituciojn de jenaj ŝtatoj en Sudorient-Azio: Burmo, Hindujo, Indonezio, Kamboĝo, Laoso, Popola Demokrata Respubliko de Koreo /Norda Koreo/, Korea Respubliko /Suda Koreo/, Vjetnamia Demokrata Respubliko /Norda Vjetnamio/, Vjetnamia Respubliko /Suda Vjetnamio/. Por la elekto validis samaj vidpunktoj, kiel ĉe la kompilo de unua volumo, sed nature koncerne al Sudorienta Azio.

En la enkondukaj vortoj ni informigas, ke la plimulton de tiuj ĉi konstitucioj karakterizas tiu, ke iliaj ĉiuj temoj estas normigaj, ĉiuj montras programkarakteran reguligon. Same, la plej multe de tiaj konstitucioj, konsidere la fundamentorajtojn, enhavas la klasikan katalogon de homaj rajtoj: esprimas, presas



kaj kunvena, unuiĝa, konscienca kaj religilibera. Estas konsiderinde, ke kelkaj konstitucioj -p.e. la hindaklopodas la dividon de ŝtato kaj eklezio. Laŭ tiu ĉi dispono en la lernejoj, subvenciigitaj per la ŝtato, ne ekzistas imperativa religioinstruado, krome la protekto de la religiolibero ne ampleksas la mondan, t.n. la politikkaracteran agadon de la konfesioj. Estas konsiderinde, ke en pluraj konstitucioj estas la rajto pri la kontraŭ ekspluadado.

La plimultaj konstitucioj regulas la ŝtatanecon kaj nome en parto laŭdevena, en parto laŭteritoria principoj. Pluraj konstitucioj akcentas, ke ĉiu civitano havas la rajton pri ŝtataneco senkonsidere al nacieco. Tiu ĉi dispono, pro tio estas konsiderinda, ĉar en kelkaj landoj, dum la kolonia periodo, la nacieca aparteno, ŝtatjure estis sankciita.

Ĝenerala karaktero de la nomitaj konstitucioj estas la valido de la ŝtatpotencaj branĉoj laŭ principo de tiu franca verkisto, filozofo Montesquieu. Escepte Korean Popolan Demokratan Respublikon kaj Vjetnamian Demokratan Respublikon, ĉiu konstitucio, unu de alia disigante, regulas la leĝofarantan, plenumadan kaj juĝistan potencojn. En plimulto de la dek landoj, duĉambra korporacio funkcias.

En la koncernaj ŝtatoj oni per senpera -rekta-, sekreta balotrajto, elektas la ĉambron de la deputitoj. La havaĵa cenzo -klasigo- de la ŝtatanoj ne estas kondiĉo de rajto pri la baloto. La aktivan kaj pasivan elektrorajton ekskludaj kaŭzoj esence estas konformaj kun la ĝenerale konitaj reguloj.

La plenuman potencon efektivigas la registaro, kiel korporacio.

La konstitucia reguligo de la juĝista potenco montras klare la efikon de jursistemo de la iamaj koloniigistoj. La konstitucioj eldiras la principon de juĝista independeco. Estas specifa karaktero de kelkaj konstitucioj tiu dispono, ke oni devas estigi Juĝistan kaj Prokuroran Ĝeneralan Konsilion, kiu kunlaboras en apliko de dispozicioj de prijura stato de la juĝistoj. La konstitucioj disponoj de la prokurora organizo aludas, unuflanke pri la publika akuzanta agosfero, aliflanke kelkaj konstitucioj -p.e. Hindujo, Burmo- kvalifikas la Plej Superan Prokuroron kiel ankaŭ unua jura konsilanto de la prezidanto de respubliko.

Ambaŭ volumoj estas elstaraj rimedoj por la internacia kaj ŝtatjuristoj kaj kultivantoj de kompara juro, eĉ por ĉiu juristo, kaj ĉiuj, kiujn interesas tiaj grandaj ŝanĝoj, kies atestantoj ni estas sur granda parto de nia terĝlobo kaj precipe sur afrika kaj azia kontinentoj.

- m.l. -

Redakcio: je propra nomo de la redaktoro  
Budapest 502, Pf 42

Fk: D-ro József Mátéffy

Fv: Magyar István

Presejo: KPM I. G.H.,

Eng.: III/400/3/179/Bp/1967, 500 pld.

INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ /IEAJ/  
/aliĝinta faka organizo de UEA/

estas fondita en 1957, dum 42a Universala Kongreso de Esperanto, en Marseille /Francujo/.

El la decidoj de la fondkunveno:

1. rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al UEA kaj fariĝi fakdelegitoj pri juro,
2. aliĝi la Asocion se eble kiel sekcion, al "International Law Association" kaj rekomendi al ĉiuj juristoj-esperantistoj aliĝi kiel individuaj membroj al naciaj sekcioj de tiu internacia asocio de juristoj.

La celo de IEAJ estas: a./ disvastigi la Internacian Lingvon inter la juristoj kaj antaŭenigi ĝian praktikan uzadon en la internaciaj rilatoj de juristoj;

b./ helpi la utiligon de la Internacia Lingvo por fakaj, profesiaj kaj sciencaj celoj de la membroj.

Ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu diplomigis ĉe Jura Fakultato, aŭ samranga Alta Lernejo kaj kiu parolas la Internacian Lingvon. Kiel eksterordinara membro povas esti akceptita ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro, aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio. - Kiel subtenanta membro povas esti akceptita ĉiu fizika aŭ jura persono, kiu per siaj kontribuoj deziras helpi la Asocion.

Aliĝojn akceptas Sekretarioj-kasistoj je la subaj adresoj.

Kotizo estas 2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare. Ĝi inkluzivas la abonon de la oficiala organo.

Organo fondita en 1966, dum 51a Universala Kongreso de Esperanto, en Budapeŝto /Hungarujo/, de la Asocio estas "INTERNACIA JURA REVUO".

Abonprezo por nemembroj 1 usona dolaro aŭ egalvaloro jare.

Plenumkomitato por la laborjaro 1966-1969:

Prezidanto: Prof. Dr. Ivo Lapenna docento pri Kompara Soveta kaj

Orienteŭropa Juro en The London School of Economics  
and Political Science, Universitato de London /Britujo/

Vicprezidantoj: Roman Sakowicz advokato, Nowa Sol /Pollando/  
Erwin Stolpe juĝisto, Berlin /Okc.Germanujo/

Sekretarioj-kasistoj: D-ro Ludwig Röhl notario  
Friedrich-von-Teck-Str 3. Höchstädt/Donau /Okc.Germanujo/

D-ro Lajos Márton sekretario de Hungara Juristo-Asocio  
Szemere u. 10. Budapeŝto V. /Hungarujo/